



HOMOJ NI ESTAS
KAJ NENIG HOMA
ESTAS AL NI FRENE
TRA LA MONDO
EN LA MONDON VENIS NOVA SENTO
IRAS FORTA VOKO
PER FLUGILOJ DE FACILA VENTO...

Kulturaj Kajeroj

EMAHE →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

JARABONO :

Simpla : 3 fkoj

Subtena : 5 fkoj

Bonfara : 10 fkoj

Sendotaj al : Micard Henri

Kulturaj kajeroj

Épineux-le-Seguin (Mayenne)

C. C. P. Nantes 2349-62

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pagô 4)

NOVEMBRO - DECEMBRO

1961

6

KULTURAJ KAJEROJ

1961

Novembro - Decembro

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

René Watier
Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesata post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

✱

Stranga Songo (P. Babin).

Esperanto tra la mondo.

Turismo :

Vojaĝo tra Provenco (IV). (F. Garrigue).

Filatelio kaj arto :

Famaj pentraĵoj en via albumo.

Intervjuo :

Kelkaj minutoj kun R. Bernard.

El la Kulturdomo :

Signifo de la popularsciencaj verkoj (prelego de Emiliĵa Lapenna).

Novaj mirindaĵoj.

Por via distro :

Nia konkurso.

Por rakonti al viaj amikoj :

Tik-tak (K. Boguŝević).

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

*La Esperantista Kulturdomo kaj Kulturaj Kajeroj deziras al
siaj amikoj agrablajn kristnaskajn tagojn kaj sendas al ili sian plej
koran novjaran saluton.*

STRANGA SONGŬO

KRISTOFORO KOLOMBO

~~~~~ EN LA KOSMO ~~~~~

Tute stranga estis la songo kiun mi faris! Imagu: mi vidis K. Kolombon, taŭge vestitan, pretan je vojaĝo al la Luno; Ronsard, la dolĉa XVI-jarcenta poeto, ludis per ĵaz-trumpeto; Francisko la unua inaŭguris atom-centralon kaj Leonard de Vinci desegnis la planojn de nova elektronika maŝino.

Ankoraŭ impresita de tiuj strangaj noktaj fantomoj, mi dum la tuta tago revidis ilin kaj serĉis la kialon de tiu eksterordinara enveno de tiuj renesencaj viroj en nian modernan mondon. Kolombo, la « sentima naviganto », kiu dum monatoj iris sur la maro ĉar li legis en la dua akto de « Médée », ke ekzistas nova mondo promesita al la estontaj ĵarcentuloj. Ronsard, kiu, kvazaŭ per fluto, kantis la sentojn de siaj samtempuloj kaj ilian novan vivmanieron, ilian novan rigardon al la naturo, al la vivo, al la amo. Francisko la unua kiu, revenante el Italujo, ŝanĝis la stilon de la kasteloj kaj malfermis Francujon al la renovigantaj artoj? Leonard de Vinci, kiu kuraĝe fidis la homon kaj faris por li planojn de maŝinoj, kiuj donos al la homaro liberon kaj potencon. Jes ili estis homoj de la Renesenco, t.e. de la Nova Naskiĝo.

La Turkoj estis fermentaj la vojon de Oriento. Oni ne plu ĉerpis el la spiritualista Oriento sed el la mediteraneaj civilizoj, el tiu « antikva mondo », kiu tiom ŝatis la penso-liberon kaj la universalajn ideojn. La Okcidento malkovris Amerikon kaj Afrikon. Naskiĝis nova socia klaso: la komercistoj. Ek de tiu tempo, la vero ne plu venis de la ĉielo sed estis transdonata de homoj al homoj: la tera inteligento superis. Eŭropo orientiĝis al racionalismo. La « homa rajto » anstataŭis la « dian rajton ». La

maŝoj de la reto fariĝis pli larĝaj kaj ellasis la liberon. Fakte, Renesenco signifis malbaro de la emo al malkovro, al esplorado, al aventuro, al konkero, ligita al la antikva spirito.

Kaj nun mi komprenis mian strangan songon: nia epoko estas nova renesenco. Ĉe la komenciĝo de la 20a jarcento ni revenis al la tradicia penso, faris kvazaŭ pilgrimadon al la fontoj de la religia spirito. La moderna scienco pridiskutas la strukturojn de la konoj ellaboritaj de post la 16a jarcento. Ĉinio, Afriko, Hindujo, la mahometana mondo vekigas kaj deziras trovi al si lokon sur la planedo. La konscio modifiĝas, ĉar la arkeologio, la paleontologio, la etnologio esploras la junan aĝon de la homaro. Same kiel la samtempuloj de Vinci kaj Kolombo ni penas kompreni la plej malnovajn civilizojn kaj sendas homojn al la nekonata universo. Ni sentas, ke tuta civilizo ŝanceliĝas. La limoj de niaj konoj ĉiuterenaj ekrompiĝas kaj, samtempe tremiĝas la limoj inter la nacioj.

Jes, se Ronsard vivus hodiaŭ, eble anstataŭ ol blovi tra fluto la dolĉon de nova libera mondo, li blovus tra trumpeto la zorgojn kaj timojn de popoloj novnaskitaj aŭ de levigantaj novaj sociaj tavoloj; Kolombo, se li estus 20a jarcentulo certe akompanus Gagarine aŭ Shepard en la kosmo; Francisko la unua fiere fidus la multimajn modernajn arkitektojn; Vinci imagus novajn eksterordinarajn maŝinojn por viziti Saturnon aŭ Venuson.

Sed, kiel malfacila estas la vivo dum la transiro.

P. BABIN.

Esperanto tra la Mondo



LA UNIVERSALA KONGRESO 1962

La lokaj Esperanto-societoj estas petataj organizi informvesperon pri Kopenhago, Danujo kaj la 47-a Kongreso. Petu al UEA senpagan materialon: artikolon pri Kopenhago; enciklopediajn notojn pri Danlando; magnetofonan programon; ekzemplerojn de la « Unua Bulteno ».

ANTAŬKONGRESO

Ĝi okazos en Helsingo (Danlando) de la 29-7 ĝis la 4-8. Petu informojn al: S-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhoj aŭ al UEA.

PRELEGOJ EN LA DANAJ PORINSTRUISTAJ SEMINARIOJ

En ligo kun la nova instruprogramo de Danlando, kiu ebligas la instruadon de la internacia lingvo en la lernejoj, kiel libervola objekto, la dana Ministerio de Edukado invitis Prof. Lapenna prelegi en la danaj porinstruistaj seminarioj.

La vojaĝo — pagita de la Ministerio — estis tre sukcesa. Poste, Prof. Lapenna estis akceptita de la ministro.

RAPORTO PRI LA AGADO DE UEA EN GAZETO DE UNESKO

La bulteno de UNESCO « Orient-Occident » de aŭgusto publikigis raporton pri la agado de UEA en ligo kun la ĉefprogramo « Oriento-Okcidento » de UNESCO.

NOVA ESPERANT LINGVA REVUO EN HUNGARIO

« Hungara Vivo », kvaronjara revuo de Hungara Esperanto-Asocio komencis aperi. Jarabono: I usona dolaro. Adreso: Budapeŝto V., Petofi Sandor-utea 17.

LA NOVAJ LIBROJ

La bone konata esperantista verkisto Jean Forge reaperas en nia literaturo: ĵus estis publikigita de li « satira novelaro el Esperantujo titolita la Verda Raketo ».

En Britujo, aperis traduko de « Lilliputo » de Jonathan Swift.

La granda brita gazeto « Daily Mail » eldonis en esperanto belegan ilustritan « Bildlibro pri bestoj ». Se ĝi bone vendiĝas, « Daily Mail » eldonos alian.

Nederlanda eldonejo vendas fotolibron kun esperanta teksto, la libro enhavas III fotojn pri infanoj de 5 kontinentoj kaj krome, 50 paĝojn de teksto de 4 verkistoj (mendebla en UEA).

POR LA FILATELISTOJ

Aperas nun en Jugoslavio, monata filatela revuo: « la Kolektanto Internacia ». Adreso: « Esperanto-Ligo », Poŝtako 239, Ljubljana, Jugoslavio.

DUA KURSO POR GEINSTRUISTOJ EN BRITIO

Grupo de geinstruistoj partoprenis esperanto-kursojn aranĝitajn fine de julio en Stoke-on-trent sub la gvidado de S-ro Pragano, docento pri esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo kaj de nia konata verkistino Marjorie Boulton. Okazis ankaŭ prelegoj kaj diskutoj pri la diversaj instruistaj de nia lingvo.

BELARTA KONKURSO 1962

La revuo « Esperanto » de oktobro anoncis la « Belarta konkurso 62 ». Branĉoj: originala poezio, tradukita poezio, originala prozo, originala drameto. Respondeculo: S-ro Albert V. King, 20 Lodore Road, Fishponds, Bristol, Anglujo.

ESPERANTO EN NEPALO

Pluraj Esperanto-kursoj komencis en la ĉefurbo Kathmandu, precipe por gejunuloj. Petu korespondantojn kontaktante Esperanto-Societo de Kathmandu, Basantpur, Kathmandu, Nepal.

EN U.S.S.R.

Kiel ĉiujare, la esperantistaj studentoj de la baltaj respublikoj organizis someran tendumon. Ĝi okazis en la regiono de la litova urbo Moletaj. Ĉirkaŭ 200 personoj, preskaŭ el tutaj regionoj de Sovetio, partoprenis.

Tre aktivis en Moskvo la Esperanto-sekcio ĉe la Medicinista Domo de Kulturo. Adreso: Gercensstraat 19, Moskvo K 9. Multaj kunvenoj kaj ĉe kelkaj koncertoj okazis; ankaŭ renkontoj kun eks-terlandanoj.

En Vilnius, ekzistas tri mezgradaĵaj lernejoj, kie esperanto estas instruata.

...KAJ EN USONO

Pli ol 150 personoj partoprenis somerajn kursojn en Pittsburgh, sekve de intervjuo de esperantisto en radio-stacio kaj de artikolo en influa revuo.

EN ROTARY-KLUBOJ

Por agado favore al Esperanto, en Rotary-klubo, la esperantaj rotarianoj, aŭ simpatianoj, estas petataj rilati kun S-ro Genermont, arkitekto, place de la République, Moulins (Allier), Francujo.

GERMANUJO

Ĉirkaŭ 2000 E-libroj de la antaŭa famkonata Germana Esperanto-Instituto en Leipzig, konfiskitaj de la Hitler-periodo estas retrovitaj kaj nun troviĝas en la Germana Stata Biblioteko, Berlino, DDR, Unter den Linden, 8, kiu daŭrigas la kolektaĵon de E-libroj.

La dekreto kiu malpermesis en DDR (Orienta Germanujo) la Esperanto-Societojn estas nuligita.

ESPERANTAJ INSTRUISTOJ

Ekzistas 14 naciaj asocioj de Internacia Ligo de E-Instruistoj. Sekretarino: F-ino Nixon, 183, Woodlands Park Road, Birmingham 30, Britujo.

NOVA AUSTRALIA ESPERANTO-FILMO

Novan sonfilmon en esperanto eldonis la aŭstralia registaro, sub titolo: « Jen Aŭstralio »; ĝi estas 16 mma mendebla de landaj asocioj ĉe la aŭstraliaj ambasadejoj (versajne, ĝi estos prezentata dum la « Kultura semajno » de Pasko en Gresillon).

VOJAĜO TRA PROVENCO

IV. - LAVERA KAJ MARIGNANE



Aleveno en Marignane

(Kliŝo : Chambre de Commerce de Marseille)

Folkloran Provencon, iom post iom anstataŭas la moderna industria. La plej karakterizajn ekzemplon ni povas konstati en la ĉirkaŭaĵo de Martigues.

Apud la haveno Marsejlo, nur apartigita de la kalka montaro Nerthe, la lageto Berre montriĝas, ek de la komenco de tiu jarcento, kiel ebla etendiĝa kampo por la marsejla ekonomio. Tiu lasta estis tiam tradicie aksumita nur al havena aktiveco; ĝian disvolvadon malebligis la geografia situo de la urbo ĉirkaŭata de montetoj. La lageto Berre estas grandega akva tavolo 15.550 hektara ; 6.000 hektaroj havas naturan okmetran profundecon. Ĝi komunikas kun la maro pere de lageto Caronte. Ĝi posedas larĝajn liberajn spacojn ĉe la randoj.

La marsejla komerca ĉambro havis grandan projekton : malfermi por la mara navigacio tiun naturan ensemblon. La ĉefa ideo estis do ebligi, dank'al la kreado de havena aparato, la starigon de industrioj, sur la randoj de la lagetoj Berre kaj Garonte. Ilia disvolvado estus faciligata de la favoraj kondiĉoj de la loko kaj de la mara komunikado al ili donitaj.

Marsejlo, jam kelkajn jarojn antaŭe komencis la kunigon de sia haveno al Rodano per la traborado de tunelo Rove, sub tiu montaro Nerthe. La urbo volis direkti sian etendiĝon al lageto Berre. Tiu tunelo, cetere, devis ankaŭ interligi la malnovan maran establejon kun ĝiaj estontaj « elkreskaĵoj ». Ek de 1920, oni ĉeestis la industrian disvolvon de tiu regiono. Pe-

trolaj deponejoj estas konstruitaj en Lavera, petroldistilejoj en 1932, en Berre.

Tuj post la unua mondmilito, la disvolvo de la utiligo de la petrolaj produktoj okazigis la kreon de multaj kaj imponaj petroldistilejoj. La grandaj francaj havenoj estis do devigataj ekipiĝi ĉar ebla trafiko, post mallonga tempo devus konstitui parton de ilia aktiveco.

Tiam, post kelkaj jaroj preciziĝis la marsejla destino : fariĝi petrola haveno. Ni notu, en tiu okazo, ke tiuj samaj avantaĝoj geografiaj de Marsejlo retroviĝas hodiaŭ pli fortaj, koncerne la saharan petrolon.

Dank'al escepta disvolvo, post la milito, de la hidrokarbura industrio, la regiono de lageto Berre estis pli ol ĉiu alia kapabla profiti la translokiĝon de la gravita centro de la petrola industrio, de la amerika kontinento en direkto al arabaj landoj. Ĝi jam posedis la ĉefajn elementojn de impona petrola industrio, kun larĝaj eblecoj de etendiĝo de la distila in-

dustrio en Francujo. Ĝi fariĝis la plej granda en nia lando.

La duobla imperativo de la plikreskado de la tonelaro de la nerafinita petrolo ĉe importado, kaj de la pliiĝo de la ŝipoj troviĝas je la origino de la petrola haveno Lavera.

Ĝi estas realizita en la sud-orienta parto de la rodo Port-de-Bouc, sur la loko mem de malprofundaj marĉoj, laŭ la sekvo de la havenaj instalaĵoj de la Ĝenerala Societo de Petrolo.

La unuaj laboroj komenciĝis dum 1948. Ĉar la tempo urĝis, oni unue konstruis du moleojn por albordiĝi. Oni tiel havis kvar ejojn por la grandaj ŝipoj.

Tiu programo postulis ankaŭ la fosadon de grandega baseno kun -12 metra altitudo. Dragmaŝinoj efektivigis tiun laboron. La repuŝitaj produktoj estis reutiligitaj por stabiligi la estontajn terbenkojn de la petrola haveno.



Dum la templimo de la finiĝo de la moleoj, du martuboj estis sinsekve utiligataj por permesi la senperan malŝarĝon de la petrolŝipoj, en rodo Port-de-Bouc.

La situo de Lavera, tre oportuna laŭ la geografia vidpunkto, kreis kompleksajn problemojn laŭ la teknika vidpunkto : antaŭa dragado de la basenoj kaj fundamento de la moleoj.

Tiuj lastaj konsistas el antaŭkonstruitaj elementoj : kolonoj el ferbetono talusitaj kaj kunligitaj sia supra parto per ferbetonaj traboj.

La profundeco ĉe la piedo de la moleoj atingas ĝis -12 m. La albordiĝa parto de ĉiu konstruaĵo prezentas daŭran naŭdek metran fronton. Ĝi estas kunligita al la tero per ponteto kun kvarmetra ŝoseo, kaj korbele, la kanalaro. Larĝa piliero, ekipita je bolardoj, ebligas la malantaŭan ŝnurfiksadon de la ŝipoj. Inter la digoj kaj la albordiĝa masivo, alia piliero konsistas el la sama aparta aranĝo por la antaŭ ŝnurfiksado.

La nova havenbaseno inter la moleoj 2 kaj 3 mezuras 150 metrojn por faciligi la evoluon de la ŝipoj. La moleo 3 ekfunkciis en la komenco de la jaro 1959. Oni komplete kanalizas la ricevon de la nerafinita petrolo kaj de la finitaj produktoj per distribuiloj. Ili permesas la samtempan efektivigon de pluraj operacioj. Ĉiu rondiro estas apartigita laŭ la speco de specialaj manipulatataj produktoj. La nerafinita petrolo estas repuŝita de la ŝipoj en deponrelaĵojn en la najbareco de la koncesio. Ili estas la propraĵoj de la rafinaj kompanioj. Poste la petrolo estas alsendita per la petroldukto ĝis la rafinejoj, ĉu al Lavera (2 km.), la Mède (7 km.), Berre (32 km.). Je kelkaj kilometroj kuŝas la flughaveno Marseille-Marignane. La tuta areo de la flughaveno havas 432 hektarojn,

entenante la terenon por pli grandigo; la spaco por alteriĝo havas 275 hektarojn.

La nova flugstacidomo estas konstruita en la orienta parto de la aviadil-kampo, en la parto de la tereno situanta inter la nova enirejo kaj la konstruaĵo de la uzino « Sud-Aviation ».


La plano de la nova flughaveno Marignane estis pristudita konsiderante la imponan trafikon de pasaĝeroj de la marsejla regiono. Tiu trafiko superis unu milionon en 1960. La flugstacidomo Marignane povas akcepti pli ol du milionoj da pasaĝeroj jare. Tiu konstruaĵo aspektas kiel vasta tuto de 22.000 kvadrataj metroj.

La pasaĝeroj kaj la vizitantoj povas eniri al vasta halo, kie estas ĉiuj ĝiĉetoj kaj oficejoj de la aerkompanioj kaj de la administracio. Stuparoj ebligas facilan eniron al la unua etaĝo, kie areo de 2.500 kvadrataj metroj estas rezervita por restoracioj kaj trinkejoj.

Tiu hotelo havas salonon por restoracio-trinkejo kun dogano por la transitpasaĝeroj, kaj restoracio-trinkejo sen dogano por la enlandaj pasaĝeroj, kaj por la vizitantoj. Tra larĝaj fenestroj la vizitantoj havas belan vidon al la ekflugejo kaj povas vidi ĉiujn prearojn pri enflugiliĝo, ekflugo kaj alteriĝo. La tegmento aspektas kiel vasta teraso al kiu povas iri la vizitantoj per speciale rezervita ŝtuparo.

Rekta vidpovo al ekflugilejo de la aerstacidomo allogas, kiel en ĉiuj Eŭropaj flughavenoj en la mondo, amason da vizitantoj.

F. GARRIGUE.



FILATELIO KAJ ARTO

Famaj Pentraĵoj en via Albumo



Nova serio de poŝtmarkoj ĵus eldonitaj en Francujo prezentas pentraĵojn de modernaj artistoj. Multkoloraj, grandformataj, ili estas veraj malgrandaj reproduktaj de la originalaĵoj.

LA KURIERO

de G. Braque (0,50 NF.)

Nigra, griza, hel-bistra, malhel-bistra, blua.

G. Braque naskiĝis en 1882. Li estis unu el la plej konataj « fauves » tiuj pentristoj, kiuj uzis la koloron, kiel ĉefan elementon de pentraĵo, kaj el la « kubistoj », kiuj simpligis la formojn ĝis ekstremo. Li multe influis la nuntempan arton.



LA KART-LUDANTOJ

de P. Cézanne (0,85 NF.)

Ruĝa, verd-griza, bistra, blua, nigra.

P. Cézanne naskiĝis en 1839 kaj mortis en 1906. Li pentris pejzaĝojn portretojn, senvivaj naturaĵoj. Lia potenceplena stilo estas tute originala. Li multe influis siatempajn artistojn kaj ankaŭ la sekvantajn. La « fauves » estis liaj disciploj kaj la kubistoj post traĵoj, liaj « posteuloj ». Tiu pentraĵo estis antaŭ nelonge ŝtelita el la Muzeo de Aix en Provence.

BLUAJ NUDAJOJ

de H. Matisse (0,65 NF.)

Blua, verda, viola.

H. Matisse naskiĝis en 1869 kaj mortis en 1951. Li unue estis neo-impresionisto kaj poste fariĝis « fauve ». Sed li ne povis elteni eksteran influon kaj kreis propran stilon. Liaj pentraĵoj troviĝas en multaj muzeoj. Li dekoraciis la kapelon Nia Sinjorino de la Roza-

rio en Vence (sud orienta Francujo), kiu estas nun multe vizitata.



DEKKVARA DE JULIO

de R. de la Fresnaye (1,00 NF.)

Flava, ruĝa, bistra, blua, viola, nigra verda.

R. de la Fresnaye naskiĝis en 1885 kaj mortis en 1925. Car li mortis juna li ne estis tiom konata, kiom la aliaj tie-ĉi priparolite pentristoj. Li kvankam estas « granda » kubisto. Oni trovas liajn pentraĵojn en preskaŭ ĉiuj muzeoj pri moderna arto en la mondo. Specialĉambro estas al li dediĉita en la Muzeo pri Moderna Arto en Parizo.



Kelkaj minutoj kun :

Roger BERNARD

La eldonaĵoj de J. Régulo-Pérez (eld. Stafeto) estas ĉiam plaĉaj kaj valoraj. Ĉiam agrable surprizas nin la nomoj de novaj aŭtoroj aŭ tradukintoj kiuj pliriĉigas niajn literaturon. El la lastaj eldonaĵoj de Stafeto unu multe plaĉas al la francoj ĉar la tradukitoj (Marcel Pagnol kaj Charles Vildrac) estas fame konataj francaj dramo-verkistoj, kaj la tradukinto franca samideano ĝis nun ne multe konata, almenaŭ de la eksterlandanoj, Roger Bernard. Ŝajnis al ni interese prezenti al la legantaro de Kulturaj Kajeroj, ne la tradukitajn dramojn (tion faris la specialistoj), sed la tradukinton. Tiucele ni petis de li intervjuon.

— *Via nomo estas nun konata de la gesamideanoj en la tuta mondo. Ni deziras prezenti vin al niaj gelegantoj kaj mi komencos per la kutima demando : Ĉu vi jam de longe estas esperantisto ?*

— Mi tre forte dubas, ĉu mia nomo estas konata en la tuta mondo. Mi havas pri la fameco tre precizajn ideojn, kiuj firmiĝis dum la kongreso en Majenco, kiam mi fiaske prezentis mian amikon Raymond Schwartz al kelkaj junaj gesamideanoj ! Ni diru, ke amikoj en la mondo konas min, kaj ke dank'al via revuo pliaj esperantistoj scios, ke mi ekzistas. Esperantisto mi fariĝis en 1931.

— *Ĉu via esperantistiĝo ek de la komenca baziĝis sur profundaĵoj al interfratiĝo de la homoj aŭ nur sur scivolemo pri lingvoj ?*

— Kiam mi naskiĝis, en 1907 (sed tion ne diru al niaj ĉarmaj samideaninoj !), mia

patro jam de unu-du jaroj estis esperantisto kaj mi sekve dum mia tuta junaĝo aŭdis pri Esperanto. Mia patro estis ĝis 1920 sekretario de la grupo en St-Denis, sed pro transloĝiĝo li forlasis sian aktivecon ĝuste en la tempo, kiam mi povus eklerni la lingvon. Ĝin mi lernis en 1931, kiam mi eksciis, ke la postan jaron okazos internacia kongreso en Parizo, kaj ke mi tiel havos la okazon kontakti kun aliaj homoj. Mia scivolemo por lingvoj nur poste kreskis kaj al mia lerneja scioto de la angla lingvo mi aldonis pli-malpli supraĵan konon de la germana kaj de la itala.

— *Ĝis nun vi verkis multajn kabaretaĵojn kaj kanzonojn konatajn preskaŭ nur de la gesamideanoj, kiuj vizitis la parizan esperantistan kabareton. Ĉu vi povus paroli al ni pri viaj spertoj en tiu kabareto, kiun animis ankaŭ Raymond Schwartz, Pr. Laurat kaj aliaj ?*

— La tempon de la « Verda Kato » mi kompreneble ne konis. Sed tiujn de la « Bolanta Kaldrono » (1933-1939) kaj de « La Tri Koboldoj » (1949-1956) mi tre aktive partoprenis. Ĉiuj (?) scias, ke tiujn tri kabaretaĵajn provojn animis Raymond Schwartz, kiun neniu laŭ mia scio kapablas anstataŭi. Dum tiuj kabaretaĵaj kunvenoj mi intensege vivis mian esperantan vivon en la plej viglaj konversacioj, ŝercoj, kanzonoj, diskutoj, ktp, kiujn partoprenis kaj ankaŭ bonege animis miaj bonaj amikoj Jean Marchand, Joseph Nels, René Dubois, Prof. Gaston Waringhien, Prof. Lucien Laurat, Jean Thierry, S. Flego, kaj aliaj : mi ne povas ĉiujn citi. Tiam, vere, Esperanto estis por mi vivanta lingvo, same kiel, cetero, dum la internaciaj kongresoj, kiujn mi ĉeestas.

— Kiel unuan grandan tradukon vi elektis « *Topaze* » de Marcel Pagnol. Ĉu plaĉis al vi la aŭtoron, la dramon aŭ la ĉefan rolon ?

— Pensi, ke « *Topaze* » estas mia unua granda tradukado, estas eraro. Antaŭ la milito mi tradukis por la esperantaj radiodisendoj (ni disponis ĉiusemajne unu tutan horon en la franca radio) teatraĵojn de J. Romain, Paul Géraudy, Ch. Vildrac, G. Courteline, ktp. « *Topaze* » mi ne elektis : ĝin proponis G. Waringhien por la kongreso okazonta en 1957 en Marseille anstataŭ « *Marius* » proponita de Pierre Petit ; la teatraĵo estis preta por ludado en Marseille, sed la franca trupo, kiu kutimas ludi en Marseille la Pagnolaĵojn, ne konsentis lerni la esperantan tekston, kaj anstataŭe hispana trupo ludis « *Georges Dandin* » en la traduko de Zamenhof.

— Ĉu vi ne renkontis specialajn malfacilaĵojn okaze de tiu tradukado ? La tradukado de teatraĵo ŝajnas, unuavide, pli malfacila ol la tradukado de romano. Ĉu vere ?

— Mi ne renkontis specialajn malfacilaĵojn en la tradukado de « *Topaze* », same kiel ne en la tradukado de aliaj teatraĵoj. Mi ne opinias, ke por tradukado teatraĵo estas pli malfacila ol romano. Mia sperto en tio estas, ke estas tre facile traduki *bonstilan* francan lingvon, tra malfacile *malbonstilan*. « *Facile* » estas kompreneble nur relativa ; sed, feliĉe, kiel skribis al mi Reto Rossetti, mia lingvo « estis edukita en la severa skolo de la kabareto ». Per tiu « severa » li aludis ja ne la atmosferon de niaj kunvenoj, sed la koncizecon kaj streĉitecon necesajn en la kabareta lingvo.

— Ĉiuj recenzistoj gratulas vin pri la elekto de « *Topaze* » kaj la traduko. Sed ŝajnas, ke la elekto de la dua dramo prezentita, t.e. « *La ŝipego Tenacity* » estas iom kritikita de kelkaj. Ekzemple S-ino Lapenna skribas : « La rolantoj impresas kvazaŭ figuroj prenitaj el la imago de la aŭtoro, ne el la vivo ». Kion vi opinias pri tio ? Kial vi elektis ankaŭ la dramon de Vildrac ?

— Estas fakto, ke en la kelkaj recenzoj, kiujn mi legis pri tiuj du teatraĵoj, preskaŭ

ĉiuj recenzistoj preteratentis la sencon de « *La ŝipego Tenacity* » kaj la penson de Vildrac. Ne mi siatempe elektis tiun teatraĵon, sed la reĝisoro de la antaŭmilita esperanta teatrotrupo, Marc Darnault, sed mi same kiel li aprezis la dramon de Vildrac. Kaj kontraŭdire al S-ino Lapenna mi trovas tre vivaj kaj tre bone tipigitaj la laboristojn, kiujn pentris la aŭtoro. Laŭ mia opinio, la teatraĵo estas tre bone prilumita de la moto ĉe sia frontpaĝo.

— Ĉu vi jam laboras pri alia tradukaĵo baldaŭ aperonta ? Ĉu denove pri teatraĵo ?

— Vi eble legis pri la sukceso, kiun ricevis en Gento kaj en Londono « *La homa Voĉo* » de Cocteau kaj « *La Respektema P...* » de J.-P. Sartre majstre luditaj de la trupo de I.A.T. sub reĝisorado de S. Flego. Laste mi tradukis romanon de tiu sama J.-P. Sartre, kiu estos eldonita de U.E.A. Nun, mi estas senlabora : mi atendas mendojn !

— Ĉu vi ne intencas verki originalan romanon aŭ teatraĵon ?

— Absolute ne ! Mi kapablas esprimi nur la pensojn de la aliaj (eble ĉar mi mem ne havas pensojn) kaj tial mi ne povos postlasi nomon faman al miaj geinfanoj — kion mi tre bedaŭras. Sed kiu prave skribis : « Ne forcez pas votre talent » ?

Ni kore dankas S-ron Bernard, kiu tiel afable respondis niajn demandojn. Ni multe ĝuis liajn jam aperintajn tradukaĵojn kaj atendas nun la baldaŭ aperontan. Eble li ne postlasos « nomon faman al siaj infanoj », sed li jam enskribiĝis en la Ora Libro de la Esperanta Literaturo.

P. B.



El la Kulturdomo.

Signifo de la popularsciencaj verkoj

Resumo de la prelego, kiun S-ino Emilia Lapenna faris en la Kastelo Grésillon la 17-an de Julio 1961 dum la Kultura semajno.

En la unua periodo de la movado ĝis la eksplodo de la Unua Mondmilito, popularsciencaj verkoj libroformaj, originale verkitaĵoj en Esperanto, ne ekzistas. Kelkajn studojn, disertaciojn kaj traktatojn, tiutempe aperintajn, oni povas konsideri fakaj kaj sciencaj, ne popularsciencaj. La movado tiam estis saturita per lingvaj kaj organizaĵaj diskutoj, ĝi ne atingis la evolu-nivelon necesan por povi produkti kaj bezoni popularsciencajn verkojn.

Sed tuj post la Unua Mondmilito aperis popularsciencia verko, kiu havis sensacian sukceson. Ĝi estas la interesa verko de E. Aisberg « Fine. Nun mi komprenas la radion. » Verkita en vigla stilo ĝi allogmaniere informas la legantojn pri ĉio rilatanta radion, kiu tiutempe estis teknika novaĵo, preskaŭ teknika miraklo. La kvalitojn de tiu verko tuj sentis multaj esperantistoj kaj tradukistoj la tekston en siajn naciajn lingvojn. Aperis 18 tradukoj en diversaj naciaj lingvoj. Sukceso, kiun ĝis tiam konis eĉ ne unu esperanta verko.

En tiu sama tempo, inter la du militoj, aperis ankaŭ aliaj popularsciencaj verkoj, kiuj vere ne havis tian sensacian sukceson, kian la verko de Aisberg, sed la sukceson oni ne rajtas identigi kun la kvalito. Nepre kvalita verko el tiu periodo estas « Jarmiloj pasas » de Haefker, duvoluma mondhistorio, kiu per sia stilo iom memorigas la mondkonatan verkon de H. E. Wells.

Post la Dua Mondmilito aperis, kaj daŭre aperas, bonaj popularsciencaj verkoj, el kiuj mi mencias nur la plej signifajn kaj lastatempe aperintajn.

La plej grava el tiuj estas la verko de Prof. Neergard « La vivo de la plantoj » (1957) la libro, kiu inaŭguris la popularsciencan eldon-serion de la eldonejo « Stafeto ».

La movado estas nun matura ne nur por povi krei tiajn verkojn, sed eĉ pli por povi bezoni ilin prepece en la grava agadkampo « Esperanto en

lernejoj ». Por lernejaj infanoj la popularsciencaj verkoj estas la ideala legaĵo, pere de kiu ili ne nur akiras la lingvoscion sed larĝigas sian ĝeneralan scion.

La verko de Prof. Neergard estas belaspekta, ne tro dika libro ilustrita per belaj desegnaĵoj (de Mads Stage), kiuj kun la tekstoj modele harmonias kaj tre altigas la valoron de la libro. Prof. Neergard estas fakulo pri botaniko, tamen lia stilo kaj esprimmaniero ne estas seke fakaj, sed el ĉiu linio radias lia senlima amo al la tuta mondo de plantoj :

« Ĉie, kie ni ne steriligis la teron per niaj domoj, ŝoseoj kaj fervojoj tie plantoj kreskas. De tagaĝaj mikroboj ĝis miljaraj arbobigantoj, ĉie la planta mondo spiras kaj konstruas organikan materion. Nia planedo estas verda ».

Prof. Neergard estas ne nur fakulo pri botaniko sed ankaŭ eminenta esperantisto, akademiano, tiel en lia verko estas kunigitaj ambaŭ kvalitoj, la lingva kaj la faka, ĝis maksimumo. Jes, la temo de la verko estas tre dankema, ĉar certe sur la tuta terglobo ekzistas eĉ ne unu homo kiu ne ŝatus almenaŭ ion el la planta mondo Tamen tio estas nur la bonŝanca bazo, ĉio alia estas la merito de la aŭtoro, kiu en sia verko ne prezentis nur diversajn plantojn, sed ankaŭ partojn de ili, profilojn, mikroskopajn bildojn. Ankaŭ ne nur la vivon de la plantoj, sed ankaŭ ilian reproduktadon kaj morton. Ne mirige, ke tiel bonkvalita kaj necesa libro ne povis resti ne rimarkita. Ĉi jam estas tradukita en kelkajn naciajn lingvojn kaj la novaj tradukoj estas anoncigitaj.

La verda planta mondo estas plaĉa kaj alloga, sekve ankaŭ interesa, sed la mondo, kies medio troviĝas sub la tera surfaco povas esti ankaŭ interesa. Pri tio rakontas al ni du popularsciencaj verkoj aperintaj en la lasta tempo : « La hela subtera mondo » de svedo Leander Tell kaj (Sekretoj de la marestajoj » de jugoslavo Petro Ĝiunio. Aŭtoroj de ambaŭ libroj ne estas profesiaj fakuloj pri la

scienca branĉo el kiu ili elektis la popularsciencan temon de sia verko. Sed ĝuste per sia verklaboro ili pruvis, ke nefakuloj povas verki kvalitan popularsciencan verkon. Neniam ni rajtas forgesi, ke Esperanton ni dankas al kuracisto, ne al lingvisto!

La mondo de Leander Tell estas la ŝtonaj grotoj. Tiu sveda komercisto en ĉiu ĉapitro de sia verko prezentas sin al la leganto, kiel pasia speleologo, kiu esploris mem preskaŭ ĉiujn svedajn grotojn kaj konas tre multajn grotojn en aliaj landoj. En la nelonga enkonduko la aŭtoro konigas la signifon de la grotesplorado por la tuta homa historio. Profunde en la tero, en mallumo de grotoj, estis trovitaj valoraj restaĵoj kaj desegnaĵoj, kiuj klarigis unuopajn epokojn en la longa historio de la homaro. Post tio la aŭtoro gvidas la leganton per simplaj sed bone elektitaj vortoj en ĉiujn pli gravajn grotojn de la tuta mondo. En la aŭstrajn ĉe-Hallstad, en kimrajn, belgajn, en la faman ĉeĥoslovakon Mackocha. Danlando kaj Finnlando ne estas forgesitaj, kvankam en tiuj landoj grotoj ne ekzistas, nur kelkaj terkavaĵoj. Francujon la aŭtoro opinias la landon de miloj da grotoj kaj li skribas: « Sen troigo oni povas diri, ke la moderna paleontologio fondiĝis en Francujo. » Ankaŭ la neekzistantaj, sed famaj grotoj estas menciitaj. Ekzemple tiu ĉe la valo de Neanderthal en Germanujo. La groto ne plu ekzistas, la valo restis. Priskribante la hispanajn grotojn, Altamira kaj aliajn, la aŭtoro ne povis, verŝajne ankaŭ ne volis, kaŝi la entuziasmon pro ilia beleco. Grandaj, majestaj kaj interesaj grotoj en Italujo, Jugoslavio, Pollando ka Sovetunio estas detale priskribitaj. Sed ankaŭ ekstereŭropaj grotoj ne estas nekonataj al tiu talentita speleologo-amatoro. Li scias, ke en Turkujo ekzistas 10.000 da ili, en Hindujo sennombraj. En Norda Ameriko, en Nova Meksiko, la leganto ekscias, kiel sensaciaj paleontologiaj trovitaĵoj estis malkovritaj en tieaj grotoj. La tuta lasta parto de la libro estas dediĉita al svedaj grotoj, ne grandaj, ne mondfamaj, sed al la speleologa koro de la aŭtoro la plej karaj.

Per sia sobra, serioza sed ne seka stilo, Leander Tell sukcesas vekti ĉe la leganto admiron por tiu majesta, humida mondo, kiu per arkvogutoj fluetantaj dum jarmiloj skulptis fantaziajn, enormajn kaj riĉformajn figurojn de stalaktitoj kaj stalagmitoj.

La mondo de Petro Giunio kaj reverkinto Marinko Gjiĵovo vivas, vere, sub la tersurfaco, estas muta, sed ne estas senmova kiel la grotoŝtonoj. La fiŝoj vikle moviĝas, naĝas, atakas unu la alian, kaŝas sin, superuzas la naivajn aŭ malfortajn. En tiu interesa libro, kiu apartenas nek al la originala (la kroatingva originalo de tiu verko ekzistas), nek al la traduka (reverki ne signifas traduki) es-

peranta literaturo, en titoloj ĉio estas fantazia kaj beletra. **ATAKANTO NAIVASPEKTA** - marsteloj ;

MASTROJ DE KAMUFLADO-kraboj, kiuj ŝangas koloron laŭ la bezono; **RABISTO PRO MIZERO**-krustacoj; **ZORGOPLENA PATRO**-marĉealetoj havantaj surventre saketon en kiun femaloj deponas ovojn; **SENDANGERA MARGIGANTO**-granda sendenta ŝarko; **EREMITO DE SOLECAJ RIOJ**-la formortanta mediteranea foko, ktp.

El tiu libro la leganto ellernos centojn da terminoj pri fiŝoj kaj fiŝmondo, sed ĉio rilatanta preskaŭ nur la mediteranean fiŝoricon. Profesia ĵurnalisto Giunio kaj arkeologo Gjiĵovo verkis tre interesan kaj utilan libron pri la muta fiŝo, kiu sub lupeo de fakulo prezentas sin pli interesa ol multaj laŭte kriantaj estaĵoj.


« Totala suneklipso » ne estas interesa nur pro tio, ĉar ĝia temo estas astronomio, pri kio malmulte ĝis nun aperis en Esperanto, sed pli pro tio ĉar ĝi tuta estas dediĉita al nur unu okaza natur-fenomeno, la totala suneklipso, okazinta la 15-an de februaro. La aŭtoroj Dro Divjanoviĉ kaj Dro Ljubiĉ klare sed tre koncize informas la leganton pri ĉio kio kaŭzas suneklipsojn, pri ilia signifo por la scienco kaj pri ĉiuj preparlaboroj organizitaj por eternigi la kelkminutan natur-fenomenon, kiu ne tiel baldaŭ ripetigos... Sur nuraj 30 paĝoj de la libreto, la aŭtoroj sukcesis mirinde multe prezenti al la legantoj, ne nur pri la suneklipso, sed ankaŭ ĉion pri la agado kaj laborplanoj de la junaj zagrebaj astronomoj-esperantistoj. Pri ilia radio-stacio uzonta Esperanton, pri la libro « Tragedio en la universo », filmscenaro, apudmara kampadejo « Esperantujo » en Primošten? Ĉio abunde kaj gustoplene ornamita per fotoj kaj desegnaĵoj. En la momento, kiam tiu prelego aperas en formo de artikolo, preskaŭ ĉiuj planoj de la junaj astronomoj jam fariĝis realo.

Popularsciencajn verkojn povas krei nur la matura movado kaj same nur la matura movado povas bezoni ilin. La fakto ke nun tiaj verkoj ne mankas plej bone pravas, ke nia movado travivas sian maturan stadion.

E. LAPENNA.

NOVAJ MIRINDAĴOJ

DE LA PLEJ GRANDA...



Tiu barajo, la plej alta en la mondo, situas en Grande Dixence en la Valais-aj Alpoj (Svisujo). Ĝi estas 700 metrojn longa, 15 metrojn larĝa ; la akvo-kvanto estas 400 milionoj da kubaj metroj.

... AL LA PLEJ MALGRANDA

Sur tiu skribmaŝino ne plu ekzistas la leviletoj portantaj ĉe la ekstremo la literojn ; ne plu ekzistas la « ĉareto » kiu prezentas la paperfolion antaŭ la literoj. Ilin anstataŭas sfereto sur kies surfaco situas la literoj, kiuj « iras » al la senmova papero.



POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

En la lasta numero vorto elfalis en la difinoj de la kruc-vort-enigĥo. Bonvolu legi :

Vertikale : 12-Oksidenteuropa **riverego**.

UNUA PROBLEMO : GRAMATIKA TASKO

En la ĉisuba teksto vi devas trovi dek erarojn pri gramatiko. Ĉiu eraro korektita donas al vi 2 poentojn, sed se vi « korektos » korektajn vortojn vi perdos po unu poenton.

BONA KORO

Ludevikino alportis al la geknaboj po du terpomojn. Kiam venis la vico de Kristoforo, tre ofte restis nur tri sur la teleroj, kaj lia patrino ankoraŭ ne ricevis sian parton. Li sciis tion de antaŭe ; li estis kalkulinta ilin antaŭ ol ili venis al li. Tamen li kolektis siajn kuragfortojn kaj diris kun indiferenta mieno : « Nur unu, patrino ».

- Du, kiel la aliaj.
- Ne, mi petas, nur unu.
- Ĉu vi ne malsatas ?
- Ne, mi ne tre multe malsatas ».

Sed ŝi prenis ankau nur unu, kaj ŝi zorge senŝeligis ĝin, disdividis ĝin je tre malgrandaj pecojn, penis por manĝi, kiel eble plej malrapide. Lia patrino observis lin. Kiam li estis fininta :

- Nu, prenu do ĝin !
- Ne, patrino.
- Nu, vi estas do malsana.
- Mi ne estas malsana, sed mi sufiĉe manĝis.

Tamen suferis Kristoforo. Lia fortika stomako suferegis ; kelkfoje li tremis, sentis kapdolorojn. Li saĝne havis truon en la brusto, truon, kiu turniĝis kaj plilarĝiĝis, kiel borileto, kiun oni estus profundiganta. Sed li plendis pro nenio ; li sentis sin observata de la patrino kaj li faris indiferentan mienon.

(Laŭ Romain Rolland).

DUA PROBLEMO

KASITA PROVERBO

1. korpo ; 2. borilo ; 3. spiro ; 4. lamento ; 5. salato ; 6. klaĉo ; 7. planko ; 8. kurado ; 9. insulto ; 10. pilastro ; 11. mondo ; 12. galerio ; 13. lozaĝo ; 14. karoto ; 15. faldi ; 16. oblato ; 17. fulmo ; 18.

karobo ; 19. korko ; 20. korano ; 21. pensi ; 22. glando ; 23. kuiri ; 24. skeleto ; 25. kaliko ; 26. manĝo ; 27. gorilo.

Elprenu el ĉiu supra vorto unu literon tiel, ke la restintaj literoj, lasitaj en siaj antaŭaj lokoj, formu novan vorton. La elprenitaj 27 literoj en la numerita vico prezentos malnovan proverbon, kies pravecon pravas multaj spertoj.

20 poentoj por la trovata proverbo. Sendu viajn solvojn antaŭ la 31-a de Januaro.

Vidu la regularon en la numero 5 de Kulturaĵoj.

AMUZAJ PROBLEMOJ (de S-ro Jarlier) :

SOLVO DE LA LASTA PROBLEMO

La horloĝo. — Post unu horo la granda montrilo troviĝas sur la nombro 12 kaj la malgranda sur la cifero 1. Diferenco : 1 dividajo.

La rapido de la granda montrilo, kiu estas de 12 dividajoj pohore superas de 11 dividajoj la rapidon de la malgranda, kiu estas de 1 dividajo pohore.

Por atingi la malgrandan montrilon la granda montrilo bezonas 1 horon. Do, la du montriloj de-

11

nove koincidas post forpaso de 1+1 horo. Poste la

11

dua koincido okazas 1+1 horo pli malfrue do 2+2

11

kaj tiel plu : 3+3 ; 4+4 . . . 11+11 + 12 horoj,

11 11 11

noktomezo.

Sume estas 11 koincidoj.

NOVA PROBLEMO :

Nombrado. — 1) Kiom da ciferoj necesigas la numerado de ĉiuj domoj de strato en kiu la lasta numero estas 300 ? 2) Kiom da paĝoj entenas vortaro, kies paĝnumero necesigis 3.987 ciferojn ?

Imp. COCONNIER, Sablé (Sarthe)
Le Gérant : H. MICARD

Tik Tak



En la hotelon eniris du sinjoroj, kiuj ekpostulis de l'mastro mangaĵojn kaj vinon. Kredeble, la mastro tre malofte havis la feliĉon akcepti kaj regali ĉe si « tiel eminentajn gastojn » ĉar li ekrigardis per okuloj scivolaj la du envenintojn kaj komencis kun rapideco malordinara plenumadi la ordonon de ili.

Post unu momento la gastoj jam estis sidantaj ĉe tablo kaj sin regaladis, babilante pri diversaj aferoj. Vino riverse fluis, kaj la servema mastro « frotadis la manojn » ĝojante pro la profito ricevota.

La gastoj ekdisputis.

— Mi vetas mil frankojn, ke oni ne povas trastari sub horloĝo tutan horon, dirante ĝuste kun ĝi tik-tak kaj, konsente kun la pendolo, balancadi la kapon.

— Jen kia bagatelo! Mi provokas vin, rediras la alia.

— Nu, donu mil frankojn kiel garantiaĵon.

— Ricevu.

La mastro aŭdante tiun ĉi interparoladon tre ekinteresiĝis pri tio ĉi.

« Ricevi pro tia bagatelo mil frankojn! Ĉu mi ne povas fari ĝin? Kaj li ĉe l'fino de tiu ĉi interparolado aliris al la tablo.

— « Min tre ekinteresis via veto: kial oni ne povus trastari tiamaniere? Mi certigas vin, ke mi precize faros ĝin. Permesu al mi ».

— Bone! Metu do sur la tablon mil frankojn. La hotelestro tuj plenumis la postulon de la gastoj.

— Ankoraŭ unu vorton. Vi devas dum via starado nenion paroli, kion ajn oni diros aŭ faros antaŭ vi.

Ĝuste kontraŭe al la tablo sur la muro troviĝis horloĝo. Sub ĝin tuj starigis la mastro kaj komencis la elplenumadon de la vetajo. Kaj la « eminentaj gastoj » daŭre manĝis kaj trinkis, ridetante kaj disjetante ŝercojn por la hotelestro. Ili faradis diversajn gestojn trompantajn penante igi lin

ekparoli. Sed ĉio estis vana. La mastro estis ne-trompigebla kaj, kvazaŭ nenion rimarkante, li daŭrigis staradi kaj tik-takadi ĝuste kun la horloĝo, balancante konsente kun la pendolo la kapon. Tiel estis pasinta plena duonhoro.

Finfine, la gastoj komencis dividi inter si la mil frankojn, kiujn estis metinta sur la tablon la hotelestro, kaj kaŝis ilin en siajn monujojn. « Ne vi vane esperas, vi ne trompigis min! » parolis al si la mastro. Iom poste, unu el la gastoj ekleviĝas, prenas sian ĉapelon kaj, nenion dirante foriras.

Malgraŭ ĉio ĉi la hotelestro daŭre staradas kaj tik-takadas akurate, restante ĉiam muta kiel fiŝo.

Post la unua levigis ankaŭ la dua gastoj sammaniere estis foririnta.

La edzino de la hotelestro, kiu estis en la apuda ĉambro, finfine estis kompreninta la komedion ludatan de la « eminentaj gastoj » en kiu ŝia edzo estas plenumanta la rolon tiel ĝeneralan, kaj ŝi komencis admoni la edzon ke tiu ĉi ĉesigu sian arlekenajon kaj kaptigu la ĉarlatanojn, kiuj estas trompintajn lin profitinte lian simplecon. Sed ti nur eksvingis la manon, silentigante ŝin kaj petante ke ŝi ne malhelpu al li finj sukcese la vetajo.

— Ho, malsaĝulo! ekkriis la malfeliĉa virino, ĉu, efektive, vi volas elasi la friponojn?

Nun restis ankoraŭ nur dek minutoj ĝis la plena horo. « Tik-tak, tik-tak », daŭrigis la mastro, balancante la kapon.

Sed ien ĝuste la tuta horo. Li finis kaj, kvazaŭ rekonsciiginta, elflugis el la ĉambro, vokante la « eminentajn gastojn ». Sed tiuj kunpreninte la monon, kompreneble, malaperis kaj, kvazaŭ dro-niĝis en akvo.

K. BOGUSEVIC.